

Gratuloj al Perla MARTINELLI
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-003-B-3, 1990.02.01

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Redakcia novjara salutmesaĝo de Giorgio SILFER, la prezidanto de Kooperativo de Literatura Foiro, aperinta en la decembra numero de Literatura Foiro, ne povas ne altiri nian atenton, ĉar fakte, kiel ĝi diras:

Cl.- "Ĉi-aŭtune Perla MARTINELLI fiksas rekordon, en la historio de Literatura Foiro. Ŝi ĉefredaktis sian sesdekunuan numeron, do unu pli ol" Giorgio SILFER, kiu cedis al ŝi la stafeton en 1980.

A.- Sub la ĉefredaktorado de Perla MARTINELLI la revuo Literatura Foiro fariĝis unu el la plej belaj esperanto-gazetoj, tio se ni konsideras la aspekton mem de la periodaĵo, sed ankaŭ enhave unu el la plej signifaj kaj kulture influaj. Se vi ne konas tiun revuon, kiu havas beletran, recenzan kaj interlingvistikan karateron, simple skribu al Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, Berno, Svislando, dirante, ke vi ŝatus ricevi specimenan ekzempleron de Literatura Foiro. Ni perados vian peton, kaj vi tutcerte havos la plezuron frandi unu aŭ du numerojn de tiu periodaĵo, kies redaktejo situas en Milano, Italio. Kaj vi certe emos aboni, eĉ se vi loĝas en lando, el kie abono al eksterlanda revuo estas malfacila. Tutcerte Kooperativo de Literatura Foiro elturniĝos, por vin kontentigi. Kiam mono ne rajtas transiri la landlimojn, tiam varoj tamen povas tion fari, kaj la prezidanto de la kooperativo, Giorgio SILFER, estas talentulo por venki ĉiujn barojn, starigitajn inter la gentoj.

Cl.- Ni revenu al lia redakcia salutmesaĝo, kie li gratulas sian edzinon Perla MARTINELLI. Ni citu lin: "Permesu, li diras, ke ĝuste al Perla mi deciĉu mian tradician saluton. Interalie, mi menciu (ĉar Literatura Foiro mem ne faris tion) ke Perla Martinelli estis ĉi-somere elektita al la Akademio de Esperanto; mia gratulo estas des pli sincera, ĉar mi rajtos ekde nun libere kritiki tiun institucion, ne vekante la suspekton ke mian sintenon motivas ia malĉeesto de Literatura Foiro tie...

A.- "Nu, kompreneble, daŭrigas Giorgio SILFER, oni povos ĉikani ke temas pri geedza konflikto. Efektive ni estas geedzoj ĝuste la dekan jaron: do niaj disputoj rajtas esti, ekde nun, pure akademiaj...

Cl.- "La jardeko de Perla fermiĝas kun revuo, kaj kun tuta societo, lanĉitaj al rimarkinda kultura produktado: sufiĉas menciigi la atingojn de la Bendo-fako, kiu plenumis la trijaran laborplanon kun 14-monata fruo! Aŭ la kompostan laboron de la Librofako: en 1990 fasketo da titoloj konkurencos al la abundo da parola kaj muzika kulturo de la lastaj tempoj. Mi aldonu la grandan kaj gravan laboron de Societo Yvonne Martinot en Bureso, speciale de Suzanne BOUROT kaj Georges LAGRANGE. (fino de la citaĵo)

A.- Suzanne BOUROT kaj Georges LAGRANGE, en la vilaĝo Bouresse en Francio, finkciigas kun multe da sindono esperanto-gastejon, kiu ricevis la nomon La Kvinpetalo. En la pasinta monato oktobro, kun mia edzo, kiu iris prelegi tie dum tuta semajno pri Edmond Privat, mi havis la feliĉon agrable ferii en tiu plurdometa renkontiĝejo. Ni kuraĝigas vin foje aliĝi al unu el la aranĝoj de La Kvinpetalo. Vi certe ne bedaŭros vian veturadon al Bouresse, kiu situas proksime de Poitiers, pro la altnivela kultura etoso kaj la simpatia spirito, kiujn kapablas reg-igi gesinjoroj BOUROT kaj LAGRANGE.

Cl.- Giorgio SILFER en sia mesaĝo, anoncas la baldaŭan retiriĝon de Perla MARTINELLI el la redaktado de Literatura Foiro. Ni ree citu lin: "Sed kiel ĉiam en volontula entrepreno, sen efektivaj dungitoj, ne eblas kateni homon al ofico: kaj ĝuste Perla anoncis, en la pasinta ĝenerala asembleo, sian intencon rezigni pri la posteno, fine de 1990. Anstataŭigi Perlan, eĉ se nur parte, estas apenaŭ imageble; sed ni devos, plimalpli frue, alfronti la problemon.

A.- "Nia kooperativo estas vivanta organismo: kaj ĉiu organismo kreskas tra provoj, foje facilaj, foje ne. Ĉi tiu por ni estos malfacila provo, same kiel estis en 1984, post la ĝeneva periodo. Sed same kiel tiam, ni trovos solvojn, konscie pri nia rolo por la esperanto-kulturo.

Cl.- "Ni tostus intertempe al Perla, al ŝia jardeko, al ŝiaj jam sesdek du numeroj, kiuj kuraĝe strebis doni esencan kontribuon por la kvalita kresko de tiu kulturo."

A.- Ankaŭ ni, nome de Svisa Radio Internacia kaj de ties geaŭdantoj, ni esprimas al Perla MARTINELLI niajn dankojn pro la ĝisnuna volontula laboro. Ni esperas, ke ŝi povos finplenumi sian oficon sentante, ke postvenos kapablulo, kiu transprenos la stafeton. Tiuj kapabluloj kaj volontuloj bedaŭrinde ne abundas en esperantujo. Povu Kooperativo de Literatura Foiro malkovri la raran perlon.

Cl.- En tiu numero 122-a, decembro 1989-a, de Literatura Foiro, en la recenza rubriko, Giorgio SILFER atentigas la abonantojn pri la verko Centjaroj de Esperanto-kulturo, kiun redaktis Klaus PERKO kaj eldonis Perspektivo en Danlando en 1989. Ni citas la komencan kaj konkludan paragrafojn de tiu prava analizo:

A.- "Inter la (bedaŭrinde ne multaj) memorlibroj dediĉitaj al la centjara jubileo, tiu ĉi aspektas aparte alloga. Ĝi fontas el la prelegaro de la internacia konferenco en Graz, iniciatita de Ivo LAPENNA: fakte la lasta manifestacio kiun li gvidis, antaŭ sia morto. La konferenco strebis al revuo pri la centjara esperanto-kulturo, per panoramo pri ĝiaj diversaj facetoj. Dek du fakuloj intervenis pri la diversaj kampoj, cele al bunta mozaika prezento...

Cl.- "Kion konkludi pri ĉi tiu omaĝo al esperanto (kaj al Ivo LAPENNA)? Nu, ke la plejmulto de la eldonitaj prelegoj povus trankvile origini el UEA-kongreso... Kaj la principoj kaj la percepto apartenis al la unua jarcento... » de esperanto.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia,

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo!